

SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN LA ESPERO

December 1947

35 årg. Nr 12

ORGAN FÖR SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET

Utnyttja det höjda statsbidraget till esperantokurser!

Den 4 juni 1947 var en märkesdag för svenskt folkbildningsarbete. Den dagen fattade riksdagen beslut om ett avsevärt vidgat statligt stöd till föreläsningar, folkbildningskurser och studiecirklar, och det är all anledning för oss esperantister att uppmärksamma de gynnsammare arbetsvillkoren även för våra kurser.


För första gången har begreppet studiecirkel definierats i en författning, och det låter så här: "Med studiecirkel avses en kamratkrets för gemensamma teoretiska eller praktiska studier över ett angivet ämne efter en på förhand uppgjord plan." Det passar ju bra in på esperantokurserna.

Studiecirklar för vuxna deltagare kan få statsbidrag med högst hälften av de faktiska kostnaderna, dock högst 3 kr. per studietimme till lärararvode och 1kr. till studieledare, högst 50 kr. för korrespondenskurs och högst 5 kr. per medlem till studieplaner och grundböcker. Till ungdomscirklar, d. v. s. sådana cirklar som till övervägande del består av ungdom i åldern 14—18 år, är de tre första statsbidragen 50 % högre eller resp. 4: 50 kr., 1: 50 kr. och 75 kr. Som villkor för att dessa frikostiga bidrag skall utgå gäller, att studietiden skall utgöra minst 20 studietimmar, fördelade på minst 10 sammankomster, samt att antalet deltagare vid varje cirkelsammankomst är lägst 5.

För att komma i åtnjutande av statsbidrag måste en esperantokurs vara anmäld som studiecirkel genom något av de godkända riksstudieförbunden, såsom ABF, IOGT, NTO eller liknande. Genom ett sådant förbunds förmedling kan även enskild studerande, som inte deltar i studiecirkelarbete, få hjälp med kostnaden för korrespondenskurs, dock med högst $\frac{1}{3}$ av den verkliga kostnaden och i intet fall mer än 25 kr. per år och person.

Anslaget till studiearbetet är inte maximerat, utan bidrag utgår till varenda cirkel, som uppfyller de föreskrivna villkoren. Låt oss sätta en ära i att i största utsträckning utnyttja den frikostighet, som den förkättrade staten erbjuder vårt arbete, och starta allt flera och flera esperantokurser landet runt!

Dupuis verdigas Skaraborg'on



Roland Dupuis

La esperantistoj de Skaraborg ĝuis la favoron de pozitiva kunlaboro kun nia franca samideano, s-ro Roland Dupuis el Rouen. Aŭtune ĝis la komenco de decembro s-ro Dupuis gvidis kursojn, prelegis kaj koncertis diversloke en nia gubernio — ĉie kun sukceso kaj bone konstatebla gajno por nia movado. Kursojn li gvidis en Skövde, Lidköping, Falköping kaj Tibro. En Skövde funkciis sub lia lerta gvidado tri kursoj, du por komencantoj kaj unu por progresintoj. Krom tio du kursoj oka-

zis en la popola lernejo por geknaboj el la 6:a kaj 7:a klasoj. Tiujn lastajn kursojn subtenis kaj pagis la loka aŭtoritato de instruado. En Lidköping kursoj kaj por komencantoj, kaj por progresintoj; en Falköping kaj Tibro kursoj por komencantoj.

Sed tre grava estas ankaŭ la prelegoj, kiuj samtempe estis ankaŭ ĉarmaj muzikvesperoj, kiam s-ro Dupuis prelegis pri muzika temo kaj ilustris la prelegon per pianomuziko. En lernejoj diversspecaj, ĉe prelegaj societoj, ĉe ABF, SLS kaj aliaj societoj okazis la prezentadoj, kiuj ĉie estis akceptataj aplaŭde kaj danke de la publiko. Grava estas la kontribuo de s-ro Dupuis en "Tago de la libro" de Skövde, kie li per muziko partoprenis belan programon antaŭ 500 personoj.

Kiam nia ŝatata amiko kaj nobla kunlaboranto nun forlasis nin, estas por ni, skaraborganoj, honora devo esprimi sinceran, varman dankon al s-ro Dupuis. Li modele laboris, dediĉante sin plenkore al la taskoj. La sveda esperantomovado, jes, la tutmonda, bezonas fakte multe da kursgvidantoj kaj prelegistoj, kiuj tiom brile kunigas kaj kapablon kaj sinoferadon kiom faras nia amiko Roland Dupuis.

Estas nia devo daŭrigi la laboron kaj rikolti la fruktojn sur la rimarkinde bone preparita kampo. Ni ĝojas postsekvi tiom bonan semiston. La SEF-distrikto de Skaraborg dankas kaj ĝisrevidas nian francan amikon.

Rivermonto.

La Espero, decembro 1947.

La Espero 1948

Ni rigardis la promesojn, kiujn ni faris en la lasta numero de 1946. Jaro pasis, kaj estas tempo kontroli, kiom ni sukcesis plenumi de niaj bonaj intencoj. Kaj honte ni devas konfesi, ke la nuna redaktoro ne povis plenumi, kion lia antaŭulo promesis! Pro tio, ni evitos levi nian pokalon kaj je la vivo de la eternevivanta Särinner fari iajn promesojn por la venonta jaro.

Tamen, ni volas iom malkaŝi pri niaj esperoj kaj planoj, realigeblaj aŭ ne.

Nia gazeto estas la oficiala organo de la Universala Kongreso en Malmö. Tio kompreneble kaŭzos, ke ni multe skribos pri la kongreso. Ĉiu, kiu volas informiĝi pri la kongreso, devas legi la gazeton.

Ni ankaŭ volonte aranĝus ian lingvostudan artikolserion, ne nur por progresintoj, sed ankaŭ por komencantoj. La planoj ne estas pretaj, sed priparolataj. Entute, ni pli multe dezirus nin dediĉi al studaj problemoj, ĉar ni supozas, ke funda kono de la lingvo estas grava kondiĉo por la progreso de la movado.

Pli multe ni ne deziras malkovri pri niaj planoj. Kaj ni vidas antaŭ ni diversajn obstaklojn. Ankaŭ en tiu ĉi jaro la ekonomio de la gazeto suferas de deficiito. La elspezoj por la gazeto ne estas kovrataj per la abonoj kaj la negrava sumo por reklamaĵoj. Ni ne scias, ĉu ni ricevos la necesan kvanton da papero.

Por la ekonomia flanko devas respondi la esperantistoj. Vi rekomendu la gazeton al viaj konatuloj. Kaj precipe vi mem reabonu, prefere tujege, por ke ne estu interrompo en la liverado. Kune ni devas konservi La Esperon!

Oso.

Korektigo.

Ni ricevis proteston, ke ni ne ĝuste referis la diskuton kaj la decidon de la jarkunveno en Gävle. Oni volas atentigi, ke la klubo de Uppsala unuanime malakceptis la proponon pri deviga abono al Espero, kaj ke s-ro Nordling tion klare menciis en la kunveno. Ankaŭ s-ro Dahl parolis kontraŭ la propono, kaj tion ni tute ne menciis.

Red.

Filatela katalogo en esperanto.

Internacia Asocio de Poŝtmark-Kolektantoj komencis eldoni internacian poŝtmarkan katalogon en esperanto (kaj en la angla). La unua parto, kiu pritraktas la anglajn poŝtmarkojn, ĵus aperis. Red. ne estas la ĝusta juĝanto pri tiaj aferoj, sed ni aŭdis de filatelistoj, ke la katalogo estas bona, eĉ bonega. Ŝajnas al ni, ke ankaŭ nefilatelistoj inter la samideanoj povus uzi tiun katalogon. Ĉu ĝi ne estus bona propagandilo, kiam oni deziras varbi poŝtmarkkolektantojn al esperanto? Provu! Cetere vidu reklamon en alia loko de la gazeto!

Mil svisaj frankoj al junulo.

Ĉu ne estas alloge, ke vi povas ricevi mil svisajn frankojn? Certe, jes. Tiu sumo estas la unua premio en konkurso, kiun la kvinan fojon aranĝas "Tutmonda Ligo por Internacia Amikeco per la Eklezioj". Krome estas multe da aliaj premioj kaj medaloj. La cirkulero de la nomita organizo estas tro longa, por ke ni havu eblecon represi ĝin, sed ni estas konvinkitaj, ke vi

ricevos de ties oficejo, adr. 37 Quai Wilson, Genève, Svislando, tiun cirkuleron, se vi petos ĝin kaj aldonos respondkuponon. La tasko ne ŝajnas tro malfacila. Do, eble vi havas ŝancon. Provu!

Esperanto ĉe la Universitato de Santiago.

Skribas al ni s-ro R. Garcia, en Santiago, ke oni konsentis aranĝi E-kursojn ĉe la Universitato en S. Tial estas grave ke oni skribu al la direktoro, amason da gratulleteroj por pruvi, ke ni, la Esperanta popolo, estas realaĵo kaj ne simpla utopio. Ricevante tiujn gratulleterojn, la direktoro povos pli bone elteni la kritikojn kaj mokojn de la stultoj. Jen la nomo kaj adreso, al kiu oni skribu: S-ro Anibal Bascunan, Direktoro de "Las Escuelas de Temporada", Universidad de Chile, Santiago, Ĉilio.

Kooperativanoj reorganiziĝis.

Dum la Universala kongreso en Bern kunvenis ankaŭ la kooperativanoj kaj decidis fondi Universalan Ligon de Kooperativanoj-Esperantistoj. Oni intencas reeldoni la antaŭ la milito aperantan organon "Ĉielarka Standardo". Interesiĝantoj sin turnu al Centra Unio de Kooperativanoj, str. Kopernika 30, Warszawa, Polando.

Petu esperantan diskon!

Svisa Espero informas, ke la svisa radio ricevis de la franca radio diskon en esperanta lingvo. Unuflanke estas registrita "Malgajeco" de Chopin, kantita de s-ino Santreuil, kantistino ĉe la franca radio, aliflanke "Nenio kaj io", muziko de P. Delmet, paroloj de R. Schwarz, kaj kantita de li. Bona okazo, peti tiun diskon en programoj kiaj "La preferata disko de la aŭskultantoj" kaj similaj programoj. (La disko aĉetebla ĉe Förlagsföreningen Esperanto.)

Propagando per filmo.

En Anglujo ekzistas 20-minuta filmo, kiu per sceno post sceno pri temoj, kiuj rilatas bezonon de fremda lingvo, propagandas esperanton. La filmo estas luebla por anglaj kinoj, kaj eble ankaŭ usonaj. La Brita Esperanto-Asocio havas la rajton post kelka tempo fari 16-milimetrajn kopiojn, kiujn oni povos aĉeti aŭ lui.

ESPERANTO - FLAGGOR

i alla julgranar i år

15 st. flaggor Kr. 1:40 portofritt.

För att underlätta expeditionen ha vi gjort i ordning kuvert med 15 st. flaggor, vilka sålunda kunna expedieras utan dröjsmål. Beloppet bör insändas i frimärken eller pr postgiro 578.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO

Fack 190 71 Stockholm 19

Ĉe la ekspozicioj en Markaryd (pasintsomere) kaj en Vimmerby (aŭtune) SEF reklamis por esperanto pere de moderna, efika reklamtabulo. En aparta skatoleto estis haveblaj reklamiloj por la korespondakurso de Brevskolan.



Glöm ej bort

SEF:s tändsticksaskar med den utmärkta reklametiketten på esperanto. 100 askar kostar 4 kronor. Beställning sker genom att sända ett kort till Malmö Esperantoförening, Kamrergatan 3, Malmö, med namn och adress samt uppgift om önskat antal askar.

Kiu presejo povas presi esperante?

La danaj esperantistoj faras esploron tutregnan pri tiuj presejoj, kiuj posedas la specialajn esperantajn tipojn. Tiel oni unue deziras meti praktikan liston al la dispoŝo de la esperantistoj, due eble malaltigi la preskostojn per la ekestanta konkurenco inter la presejoj.

Komunista frakcio de SAT.

Per alvoko en la sveda Laborista Esperantisto oni ekscias, ke provoj nun estas farataj, starigi komunistan frakcion en SAT.

Raportitaj kursoj.

En Vilshult kurso kun 15 partoprenantoj.

La kursanoj deziras reveni.

De la 19-a ĝis la 26-a de oktobro en Vejle, Danlando, okazis sub gvido de s-ro Friis esperanta kurso kun pli ol 30 partoprenantoj. Oni ĉiutage havis belegajn ekskursojn en la ĉarma ĉirkaŭaĵo de Vejle kaj sur la fjordo. Partoprenantoj el la kvar nordaj landoj. Finna samideanino parolis pri Aleksis Kivi. La studtemoj estis tre variaj. (Laŭ Birger Nederman.)

Junularkunveno en la Alpoj.

De la 18-a ĝis la 24-a de majo 1948, tuj post la unua kaj tutgermana esperantokongreso je Pentekosto 1948, okazos Internacia Junular-Kunveno en la Alpoj. La Junular-Sekcio de la Germana Esperanto-Asocio invitas ĉiujn junulojn partopreni en tiu certe neforgesebla okazaĵo. La partopreno kaj la vojaĝo interne de Germanujo estos tute senkostaj. (Nur por eksterlandaj geamikoj!) La elspezojn por ili portos la Germana Esperanto-Asocio. Vin turnu al Germana Esperanto-Asocio, München 23, Postfach 47, Germanujo, kun la rimarko "Internacia Junular-kunveno".

Tidningen Freden

har numera infört esperantoavdeln. i sina spalter. För fredsarbetet intresserade esperantister kunna prenumera på tidningen för kr. 2:25 pr helår. Begär provnummer. Skriv till Fredsföreningens byrå, Jungfrugatan 30, Stockholm 5.

- MÅNADENS BOKTIPS -**ESPERANTO - KRESTOMATIO**

Läsebok för alla åldrar sammanställd av
H. A. de Hoog — Mr. A. J. Kalma — W. F. Kruit
Frato Wigbertus van Zon.

119 sidor Kartonnerad Kr. 3:—

— o —

ESPERANTO 60-JARA

Skizo pri la evoluo de la lingvo literatura
G. J. Degenkamp

58 sidor Kartonnerad Kr. 2:75

Vid förskottslikvid tillkommer 10 % för porto.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO

Fack 190 71 Stockholm 19 Postgiro 578



Meddelande från Esperanto-Institutet

Svenska Esperanto-Institutet

planerar i samråd med ABF en instruktionskurs för kurslärare och cirkelledare under tiden 26 juni—9 juli. För att utröna intresset för denna kurs ombedes intresserade före 1 januari tillskriva Institutet, som då kommer att avgöra, om kursen skall äga rum.

Nova sekcio de SEF**Mondfederalista sekcio fondita.**

La nombro de sekcioj kreskas en SEF. Fakte tio montras, ke la svedaj esperantistoj pli kaj pli konsideras la gravan signifon de esperanto, uzante ĝin por plej diversaj celoj kaj interesoj. Universala Ligo jam nombras inter la SEF-anoj sufiĉe da membroj, kiuj aliĝis al la celo de U. L. por ne nur propagandi la ideon de mondregistaro sed ankaŭ edukadi sin reciproke por mondĉivitaneco. Tio estas ebla en U. L. per internacia korespondado, kursoj, internaciaj kunvenoj, vojaĝoj ktp. Mondfederalista sekcio de SEF volas aktive labori por efektivigi la U. L.-programon en Svedujo.

Ni ĝojas anonci al vi, ke la organo de U. L., la konata kaj tre ŝatata LA PRAKTIKO, aperos denove en 1948. Oni fine sukcesis certigi paperon kaj necesan permeson por prezi la ĵurnalon. Se vi jam dekomence deziras ĝin, afable sendu la abonkotizon al ĉisuba adreso aŭ al Eldona Societo Esperanto, Fack 190 71, Stockholm 19. La abono kostas por Svedujo kr. 8:40. Por aktivaj membroj de U. L. la abono estas senpaga.

Mondfederalista sekcio de SEF kunigas ĉiujn membrojn de U. L. en Svedujo, kiuj aktive deziras partopreni la tutmondan paclaboron, uzante por tiu celo Esperanton.

Petu informojn pri Universala Ligo kaj pri Mondfederalista Sekcio de SEF ĉe la sveda reprezentanto por U. L., Lennart Aberg, poŝtfako 16, Skövde. Poŝtgiro nro 33 23 31.

Belan kaj ĝojoplenan Kristnaskon kaj pli feliĉan novan jaron

ni deziras al ĉiu nia amiko enlande kaj eksterlande.

Samtempe ni informas niajn amikojn, ke dum la sekvaj 4—5 monatoj nia adreso estas la sube menciita; dum tiu tempo subskribinto havos la taskon enigi en la svedajn rilatojn kaj helpi la alvenintajn hungarajn arbarlaboristojn, kiel ilia socia kuratoro kaj interpretisto ĉe Uddeholms AB.

F. Szilágyi — R. Szilágyi
Revirkontoret, Brattfors, Lindfors.

Internacia Poŝtmarka Katalogo.

Volumo I. Granda Britujo.* Kr. 3:65

Esperanto för filatelister, korrespondenskurs Kr. 3:50

Medlemsavg. inkl. tidn. 1948 för I.A.P.K. Kr. 5:—

* katalogen kan erhållas med titeln på esperanto eller engelska.

BERTIL ZELL

Postgiro 24 09 21, Box 50 85, Göteborg 5.

Från förbundssekreteraren

Avgifter till SEF för 1948.

Arbetet på sekretariatet skulle i hög grad underlättas om medlemsavgiften för till Svenska Esperanto-Förbundet direktansluten medlem — kr. 7: 50 — inbetalades redan under december månad. En tidig inbetalning betyder dessutom att Svenska Esperantotidningen erhålles utan avbrott under 1948. Förbundets postgiro-konto är 2012 och adressen bara Tegelbacken, Stockholm. Enbart prenumeration under hela 1948 kostar 4 kr.

Obligatorisk prenumeration.

Från 1948 ingår enligt beslut på årsmötet kostnaden för prenumeration automatiskt i den avgift, som för- eningsansluten medlem betalar till sin förening.

För att sådan medlem skall få sin tidning från årets början är det av vikt, att den avgift som förening be- talar till SEF — kr. 5 pr medlem — insättes på för- bundets postgirokonto så snart som möjligt. De för- eningsansluta medlemmarna uppmanas att underlätta sina resp. kassörers arbete genom att redan nu utan anmaning erlägga medlemsavgiften för 1948. (Om flera personer av samma hushåll är medlemmar i förening, betalar föreningen till SEF 5 kr. för en av dessa och 2 kr. för övriga hushållsmedlemmar).

Kontakt med esperantovärlden.

Att regelbundet läsa Svenska Esperantotidningen innebär att ha god kontakt med esperantorörelsen. Därför är det av vikt att varje esperantist, som kan språket så pass att han kan läsa esperantotext, pre- numererar på tidningen. Varje aktiv esperantist bör vidare fatta det som sin plikt att förmå andra esperan- tister att läsa Svenska Esperantotidningen regelbundet.

Lars Brusewitz

heter den sympatiska chauffören på I. O. G. T:s propa- gandabuss, som nu far Sverige runt. Han är en ivrig esperantist, som i fortsättningen kommer att vara en föreningslänk mellan förbundssekreteriatet och espe- rantisterna ute i landet. Förutom att han i största allmänhet skall träda i kontakt med esperantisterna på de orter han besöker, skall han också göra propa- ganda för esperanto genom affischering, spridande av trycksaker m. m. Sök kontakt med honom, om han kommer till er ort! Han har många goda förslag att komma med och lyssnar gärna på era uppslag och han vill gärna hjälpa er att övervinna de svårigheter, som kan finnas just på er ort.

Rapportera kursverksamheten!

Det är av vikt för det fortsatta propagandaarbetet att sekretariatet får in rapporter om alla de esperanto- kurser som varit i gång under höstterminen.

Kursanordnare uppmanas att till SEF sända in namn och adress på eleverna och lärarna. Tala också om kursens karaktär. D. v. s. om det varit en barnkurs eller en kurs för vuxna m. m.

Matrikeln.

För att kunna iordningsställa en tillförlitlig matrikel över SEF:s medlemmar inom den närmaste tiden, ber vi alla föreningsstyrelser att till sekr. insända namn och adress på samtliga styrelsemedlemmar med särskilt angivande av korresponderande styrelsemedlems namn.

F-N-Deklarationen.

Insamlandet av namn för F-N-Deklarationen fort- sätter, men blanketterna börjar tryta på sekretariatet. Säkert är det många, som har outnyttjade blanketter liggande. Har ni ej möjlighet att använda dem själv, sänd då snarast över dem till sekr. så slipper vi göra ett dyrbart nytryck!

SVEDA KRONIKO

Malmö.

La prikongresa laboro en plena florado. La Skania Foiro okazos 24/7—1/8. Tio signifas, ke la du lastaj tagoj de la foiro estos la du unuaj tagoj de la esperanto- kongreso. LKK decidis transdoni al la programa sekcio la taskon pretigi proponon pri programo, en kiu la kongresanoj havu eblecojn viziti la foiron la du unuajn tagojn. LKK decidis presigi 10 000 ekz. de glumarko por valizoj. La marko estu senkoste sendota al ĉiuj partoprenontoj.

La konstanta sekretario de UEA, s-ro O. T. Nico- laisen, alvenis al Malmö por kunhelpi al la arango de la 33-a kongreso. Li ankaŭ gvidas 3 kursojn en Malmö.

Malmö.

La klubo 22/10 faris programon pro la 60-jara jubileo de Esperanto. Parolado de Leonard Vasiljef el Kopen- hago. Muziko kaj kafo ktp. — 29/10 Bern-vespero kun montrado de filmo, kiun faris C. O. Östling dum la kongreso en Bern. Krome montrade de aliaj bildoj el Bern. Parolado de J. Strönne pri la estinta kongreso. Kaftrinkado. — 8/10 s-ro Berceli el Budapest parolis en la klubo pri la nunaj cirkonstancoj en Hungarujo. — La membronombro nun superas la iaman rekordon el 1935, kiam oni notis 135 membrojn. Nun oni havas 139. — La 6/12 okazos kristnaska foiro.

Västerås.

La klubo en Västerås eldonas klubgazeton hekto- grafitan. Pledas por nova latino kiel internacia lingvo — por esperanto. Donas konsilojn pri literaturo por diversaj fakoj. Invitas al studrondoj komenca, sinjor- ina, daŭriga, konversacia. Kunvenas ĉiun duan vend- redon en Anderssons Konditori, Köpmangatan. Unua- foje la 3-an de oktobro.

Skövde.

Roland Dupuis gvidas plurajn esperantokursojn. Li ankaŭ gvidos francan kurson en la kadro de ABF. — Skövde aperigis kluban gazeton "La voĉo de l' klubo".

Hallsberg.

La klubo havas 11 membrojn. Preskaŭ ĉiuj estas fervojistoj. Do, se vi preterpasas, rigardu, ĉu vi ekvidas verdan stelon! Ĉar mi supozas, ke la hallsberganoj portas tian dum la deĵorado?

Sundsvall.

Ni komencis la laborsezonon tre energie. La 4an de okt. ni aranĝis Bern-vesperon al kiu ni invitis samide- anojn el Härnösand kaj Söderhamn. Kolektiĝis ĉirkaŭ 50 personoj.

Rakontis Anna Dahlgren. Poste ni montris kelkajn lumbildojn el Svisujo. "Tremolo" nin regalis per bela muziko.

Laŭ propono de samideano el Söderhamn ni decidis sendi skribajon al Radioservo petante pri pli multe da Esperantoprogramoj en la sveda radio.

Komenca kurso sub gvido de la kluba prezidanto, s-ro Esberger, startis la 28an de okt. En tiu kurso parto- prenas proksimume 15 personoj. Ni esperas pri nova vigla vivo por nia iom dorminta klubo.

Borås.

El la dumsomera dornroza dormo vekigis la Verda Rondo kaj intencas post la refreŝiga tempo esperantigi la urbanojn.

Alamo konkeris ministron!

S-ino Alamo de tempo al tempo ricevas leterojn, kiuj rakontas pri la propagando, kiun ŝi faris, kaj Red. nun havas okazon represi parton el unu el tiuj leteroj, direktitaj al ŝi Ĝi venis el Polujo. Jen:

"Vi faris por nia movado tre multe. Vi serioze plivigligis nian movadon. Ĉu vi ekkredas, ke vic-ministro de klerigado, kiun ni vizitis kaj kiu tiam estis nur simpatiulo de nia movado, nun deklaris sin kiel esperantiston? Li partoprenis nian landan kongreson (4-5 okt. 1947) kaj sidis ĉe la prezida tablo. Li elparolis varman paroladon por esperanto, kio estis por ni ĝoja kaj granda surprizo. Li sukcesis konvinkigi la ministron, kaj tiu tute ŝanĝis sian opinion pri esperanto. Ĝis tiam la rilato de la pola ministro de klerigado por nia movado estis malfavora. Post la konvinkigo li petis, ke la vicministro salutu la kongreson en la nomo de la ministerio kaj en lia propra. La ministro Skrzyszewski eĉ tre senkulpigis sin, ke bedaŭrinde li ne povas persone saluti nian landan kongreson pro multaj okupoj ekster Varsovio.

Nun s-ro Garnarczyk, vicministro de klerigado, estis elektita kiel prezidanto de la Varsovia grupo de Unuiĝo de Esperantistoj en Pollando. La laboroj nun progresas, kaj ni esperas multon fari en la kuranta vintra sezono. Tiaj sciigaĵoj estas por vi certe agrablaj."

Västerås.

Kia bela nomo por la kluba gazeto de la elektra urbo: Veko! Kaj la klubo vekas. Vekas la indiferentulojn. Kaj la kluba vivo estas kompare vigla. La jarraporto anoncas, ke apotekisto Östenberg faris prelegon pri Mondlingvaj projektoj. Stellan Engholm enkondukis diskutadon pri la temo Kiu lingvo plenumas la postulojn pri internacia helplingvo? Je tiu okazo oni invitis la studrondojn de Arosgården. S-ro Axel Andersson partoprenis la kurson de Brunnsvik. S-ino Anna Vestberg gvidas kurson, kaj oni havas konversacian rondon.

Gävle

Ahlstrand gvidas kurson en ABF kun 20 partoprenantoj. Aström havas du kursojn en la lernejo. Seso da veteranoj komencis studi por la supera ekzameno kun Liljemark kiel kontrolanto.

Vimmerby.

Olle Olsson gvidas kurson por lernejanoj. Oni ankaŭ aranĝis hobia-eksponon, en kiu esperanto prenis gvidantan lokon. Ankaŭ malantaŭ tiu ekspozicio sin certe kaŝas Olle Olsson kiel moviga motoro.

Bokens dag

Till minne av Zamenhofs födelse firar esperantisterna varje år en **Bokens dag** den 15 december. Vi har visserligen alltför många "dagar" i vår tid, men den esperantiska bokens dag torde vara äldre än de flesta av sina medtävlare. Bakom detta firande ligger den riktiga känslan av att det är esperantos litteratur, som bär upp språket. Ju mer dess litteratur sprides, dess mera vinner språket fäste i samhället.

Till esperantistens rätta begående av Bokens dag hör skyldigheten att den dagen inköpa minst en ny esperantobok. Denna skyldighet blir med tiden en allt lättare börda, ty det finns allt mer att välja på, och var och en kan nu välja böcker för sina speciella intressen. Man behöver inte längre köpa en bok, därför att den är tryckt på esperanto, utan nu köper man en esperantobok, därför att den är intressant. Och det kan väl knappast sägas vara någon uppoffring.

Genom Svenska Esperanto-Tidningens spalter har vandrat ett ansevärt antal förslag till lämplig litteratur. Nu har Ni endast att välja det bästa.



— Ne estis io grava. Nur najbaro, kiu aŭdis bruon el ĉi tiu apartamento.

Volumo V
baldaŭ aperos.

Bind. kr. 7: 25
Broŝ. kr. 6: 50

Al la membroj de LITERATURA KLUBO ĉi tiu volumo estos ekspedata (espereble) tuj antaŭ Kristfestoj; al eksterlandaj revendistoj kaj je novaj mendoj komence de januaro.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO
Fack 190 71 Stockholm 19 Postgiro 578

FRANSK GRAMMOFONSKIVA

med sång på esperanto **Kr. 7: 50**

NENIO KAJ IO (Quelque chose et rien)
Text och sång av Raymond Schwartz

MALGAJECO (Chopin: Tristesse)
Sång av Marguerite Santreuil

Enär förlaget endast lyckats få hem 13 ex. av denna skiva och flera ej kan väntas kommer beställningarna att expedieras i den ordning de inkomma.

Vid förskotts betalning tillkommer 60 öre i porto;
vid postförskott 85 öre.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO
Fack 190 71 Stockholm 19 Postgiro 578

La unua mondlingva propagandisto de Svedlando

Christopher Polhem estis jam dumvive ege honorata homo de granda aŭtoritateco. Kvankam li ĝis sia dudek-kvina jaro vivis tute nekonata en la kamparo, perlaborante sian panon modeste kiel bona inspektisto kaj post tio pasigis tri jarojn ĉe la universitato de Uppsala sen plenumo de la ekzameno, li tridekjara estis famulo de regna reputacio. Tion li atingis per sia novkonstruo de la astronomia horloĝo de Uppsala (en 1690 — pripensu, ke laŭ ĵurnala noteto la unua norvega astronomia horloĝo estas pretigita en 1947) kaj per sia mineja elevatora maŝinaro, kies modelon li ekspozis al Karl XI-a en 1691. Al la fakaj teknikistoj de lia tempo impresis pleje liaj "stangaraj moviloj", la unua solvo de energitransporto antaŭ la evoluo de la elektra tekniko. Al ni kiel modernuloj ŝajnas eble plej admirindaj liaj inventoj de la Polhemseruro, kies moderna formo nomiĝas Yaleseruro, de la universala artiklo, de la frezilo, kaj nekomperebla vico da maŝinoj por Stjärnsund. Tiu fabrikejo estas la naskiĝloko de moderna industria tekniko kaj organizo per konscia raciigo, ekstrema anstataŭigo de homa forto per naturforfo, detala labordistribuo por specialistigo kaj aliaj aranĝoj por amasa produktado laŭ la tipo de Detroit en 1924, ekzemple kontrolo per konformaj kalibriloj. Inicianto kaj ellaborinto de ĉio estis sola Polhem.

Estas grava kaj memorinda fakto, ke tiu eminentulo estis fervora kaj entuziasma propagandisto por internacia helplingvo. Li verkis pli ol dek traktaĵojn kaj eseojn pri tiu temo, ĉiuj nepresitaj kaj, konservitaj plejparte nur kiel fragmentoj, sed sufiĉas kiel pruvo pri lia intereso kaj agado. Ĝuste ilia fragmenta stato supozigas, ke li laŭ tiutempa kutimo cirkuligis siajn traktaĵojn inter siaj konatuloj (kiam la homaro lernos skrupule redoni siajn pruntitajn librojn?) Kvankam nenio estas konata el aliaj fontoj li verŝajne uzis la traktaĵojn kiel manuskriptojn por prelegoj pri la temo de la universala lingvo, kaj certe li diskutigis la aferon en amikaj rondoj. Polhem ja estis sociema viro, kiu volonte donis al la amikaro taskojn por pripensio.

Polhem havis personajn motivojn por siaj helplingvaj ideoj. Li malfrue komencis siajn studojn. Tial la temporaba lernado de la latino al li ŝajnis speciale enuiga kaj malracia. Li opinias, ke oni perdas sian intereson pri problemo ampleksan tempon antaŭ ol oni povas ĝin latine trakti. Polhem komencis studi latinon por fariĝi termezuristo, sed kiam li sciis latinon, liaj planoj jam celis multe pli alten. "Ĝi postulas duonon de nia vivo", li argumentas kontraŭ la latino. Simpla, senescepta gramatiko kaj mallonga vorto por simpla, fundamenta ideo estis liaj necesaj premisoj por "filozofia lingvo". Li havis tamen — estis 150 jarojn antaŭ la apero de esperanto — fortan senton, kiom malmatura estis la tempo por la realigo de mondlingvaj ideoj. Proponante sian lingvoprojekton, li intencis nenion plu ol "montri la metodon kaj la manieron, per kiuj ĝi plej konvene povas esti konstruata". Memorante tion, ni momente rigardu la "filozofian lingvon" de Polhem.

Elirante de la aranĝo de la vokaloj a, e, i, o, u li proponas kiel personajn signojn as (mi), es (ci), is (li), os (ni), us (vi), kaj aldone ys (ili). Por formi temposignojn i povas kiel media vokalo signifi estantan tempon: si (prezenco), la antaŭiranta e devas signifi estintan tempon: se (perfekto) la sekvanta o logike esprimas estontan tempon: so (futuro). a kaj u restas kaj povas utiliĝi por marki komencon kaj finon. Laŭ Polhem do estas "li komence estis": isa, "ni estos": oso. Sed ĉi estas miksaĵo de a kaj e. Tial asä signifas: "mi post komenco estis". Oni bone lokigas ö inter i kaj o. Tial estas esö: "ci baldaŭ estos" ktp.

La tradukon de la unuaj frazoj de la biblio Polhem donas laŭ la sekvantaĵo: Spar-ila-fk. Spar... dio, ila... li kreis komence, f... ĉielo, k... tero. Ika-r. Ika... li (la tero) estis komence, r... malplena. Ktp.

La aranĝo de la vokaloj krome ludis rolon por la vortfarado, kiel estas videbla el la skemo:
la — fajro, le — etero, li — aero, lo — akvo, lu — tero.

Paca Kanto

(Melodio de la Esperantohimno)

Nia tero estus jam ĝardeno
De feliĉo, se en ĝiaj floroj
Ne troviĝus tiom da veneno,
Se pacemaj estus niaj koroj!
Fruktoj kreskas bonaj kaj sufiĉaj.
Se la pensoj estus nur raciaj!
Ĉiuj gentoj estus jam feliĉaj,
Se ne sentus ili sin "naciaj".

Limoj la malammon renaskigos
Kaj malhelpas nin la vojon vidi.
Kiam ni la cerbon liberigos?
Kiam ni kuraĝos findecidi?
La popoloj povas nun kompreni
Unu la alian: Esperanto
Helpos! La feliĉo povas veni!
For la iloj de la batalanto!
Sango ne pli longe devas flui.
Homoj, nun meritu tian nomon!
Venu! Venu! Provu ĝin konstrui,
Por la Paco la tutmondan domon!

Alfred Rehtz, Pinneberg.

ma — spirito, me — hidrargo, mi — sulfuro, mo — salo, mu — ŝtono.

El tiuj vortoj oni poste povas are formi terminojn, ekzemple molu — minsalo, mole — salpetro, molo — vitro, moli — kvarckristalo, lama — suna fajro, lamo — pulva fajro ktp. Laŭ la kemiaj konceptoj de tiu tempo la terminaro estas altgrade logika. Ĝi estas interesa krome el la vidpunkto, ke ĝi estas rudimenta formo, anticipanta la nunan kemian simbolaron de la sveda sciencisto Berzelius: molu — NaCl, mole — KNO₃, moli — SiO₂. Alia principo por vortfarado baziĝas sur la vokalvico a, e, i, o, u relatita al la sentoj: vido, aŭdo, flaro, gusto, palpento. Se b estas relatita al herboj, g al bestoj, p al lignaĵoj, f al la ĉielo, oni povas konkludi: ef — tondro, eg — besta bleko, ip — parfumo, up — ligna konstruaĵo, ep — muzikilo, op — frukto, of — likvoro ktp. Alia sistemo konstruiĝas tiamaniere: v signifu v(ivanta) o signifu sub la o(ndoj), tial vo — akvobesto. e — e(naera), f — frukto, tial fe — nukso, r — r(acia), a — a(lta), tial ra — nombro ktp. Kompreneble Polhem uzis la latinon por la parenteze mallongigitaj vortoj.

Alie Polhem zorge evitis la latinon por sia "filozofia lingvo". Li uzis bildon por pravigi sian antipation kontraŭ la latino same kiel modernaj lingvoj: Inĝeniero faras multe pli bonrezultan laboron, se li planas urbon en tute nova, libera, neokupita grundo ol se li estas devigata reguligi hazarde kreskintan koloniistan urbon. Same nur estiĝas lamanta kompromisaĵo, se lingvisto (kiel oni proponis dum la XVIIa kaj XVIIIa jarcentoj), provas normigi latinon aŭ nacian lingvon. Aktuale la kritiko de Polhem estas ege uzebla kontraŭ kreaĵoj tiaj, kia Basic, kies ideo tute ne estas novaĵo. La lingvopropono de Polhem estas ege influita per la ĉefaj principoj por la "filozofia lingvo", kiuj gvidis liajn samtempulojn Dalgarno kaj Wilkins. Sed kontraŭe al tiuj Polhem neniam ligiĝis por detala solvo de la helplingva problemo. Efektive li batalis nur por la raciigo de la mondlingvo, la instrumento por internacia ideintersanĝo, same kiel li batalis por raciigo de la meĥanika laboro. Pro tiu koncepto nia plej granda inventisto estas grava morala apogo al la esperanta movado kaj povas esti utiligata en ĝia propagando. Kaj tiamaniere li atingus sian celon, kiun li esprimis finante unu el siaj traktaĵoj: "Se tiu simpla propono povus kontribui al io pli bona, ĉar ĉio devas evoluiĝi el malgrando al granda, tio estus al mi kara".

E. Olsson.

Kongresa rapsodio

Letero al samideano en Sydney.

Pardonu mian longan silenton! Tamen ne mi kulpas sed la Bern-kongreso. Ho, la kongreso ja estis brila, interesa, mirinda, sed... ĝi tiom pliigis la korespondadon, ke oni preskaŭ bezonas dungi sekretarion.

Vi petis min rakonti iom pri ĉi tiu evento, sed ĉu vi ne sufiĉe legis pri ĝi en la gazetoj kaj nun estas plenŝtopita ĝis la gorgo per kongresaj raportoj? Nu, se vi povas digesti pli multe, mi ja volonte prezentos al vi kelkajn detalojn.

La vojaĝo, kiel vi komprenas, ne estis sen aventuroj. Partoprenis 170 svedoj. Granda familio, ĉu ne? Sed, kia katastrofo, ĝi perdis kvin el siaj infanoj inter la Frankfurta ruinoj!! Cetere, du malaperis jam en Kopenhago. Oni supozis, ke ili forgesis rigardi la horloĝon, sed mi kredas, ke ilin fortimigis Norda Ekspreso.

Norda Ekspreso!! Ĝia famo eble jam atingis vian kontinenton, se ne, mi nur volas rakonti, ke en tiu "luksa" trajno mankis ĉio krom karbofumo kaj kiam la blankuloj el Nordo atingis Basel, ili aspektis kiel negra familio. Sed ne kredu, ke la esperanta humoro suferis de tio. Tute ne! Oni ludis kaj kantis, kuiris kafon en la kupeoj, fratece dividis kolbasojn el Skanio kaj buterpanojn el Norrland kaj gaja sinjoro el Uddevalla kuris de unu kupeo al alia, stimulante la gefratojn per "polka-grisar". (Stranga sveda vorto, kies laŭlitera traduko estas "polko-porkoj", tamen ne temas pri bestoj sed pri speco da svedaj bombonoj.)

La svedoj laŭdire estas formalaj kaj ceremoniemaj, sed, kredu miajn vortojn, kiam ili nur transpasis la limojn de "Krängel-Sverige", (alia stranga vorto, kiun mi klarigos venontfoje, ĉar ĝi postulas apartan leteron) ili tuj fariĝas viglegaj kiel bovidoj sur verda herbejo.

Sed kvazaŭ fabela trajno el la Lando de l' Feliĉo certe ŝajnis nia ekspreso al la germanaj infanoj, kiuj postenis sur la peronoj kaj laŭlonge de la fervojaj digoj kaj ĝojege akceptis la bongustaĵojn, kiujn ni ĵetis al ili. Kaj ĉe ĉiu stacio ni vidis amason da germanoj, kiuj ĉiel klopodis havigi al si vagonaran lokon, en la koridoroj, sur la bufroj, eĉ sur la tegmento.

Kiam ni trapasis la germanan kamparon, kie ĉiu kampeto estas kulturita, ne estis facile imagi, ke Germanujo antaŭ ne longe estis la scenejo de terura milito, sed pri tio atestas tiom pli la urboj, kiuj de Hamburg ĝis Freiburg estas malpli detruitaj. Esceptoj estas Heidelberg kaj Baden-Baden, kiuj krom du aliaj urboj estas la solaj en Germanujo, kiuj ne estas difektitaj per bomboj. En Rastatt mi trovis inter la ruinoj murorestaĵon, sur kiu kvazaŭ parodie brilis la vortoj "Goldener Stern". Vere, la germanoj ne vivas en la brilo de oraj steloj, sed en la ombro de morto kaj mizero!

Veni el Germanujo al Svislando estas kvazaŭ eniri paradizon, kie ĉio abundas... krom hotelĉambroj.

Tion mi kaj kelkaj aliaj spertis, kiam ni alvenis al Bern malfrue en la vespero kaj trovis niajn menditajn ĉambrojn jam okupitaj. Tamen ĉio ordiĝis kaj ni ne bezonis deĵori kiel noktogardistoj.

La situo de Bern min ravis. Jam de la hotela teraso, kie mi frumatene trinkis teon inter palmoj kaj oleandroj, mi havis ĉarman vidaĵon de montoj kaj alpoj kaj de la rivero Aare, kies klara akvo invitis al dolĉa bano. Kaj super ĉio sin volbis la ĉielo kiel blua sunombrelo.

Bern estis ideala kongresurbo. Tion opiniis ĉiuj kongresanoj ek de Islando ĝis Sud-Ameriko. Kiom amuze esti denove en internacia rondo, inter amikoj malnovaj kaj novaj! Anglojn oni ja vidis en ĉiu angulo, sed mi ankaŭ havis bonŝancon trovi francan generalon, hungaran doktoron, italan patron kaj negrinon el Sierra Leone. Kaj mi ne forgesu raportojn, ke mi renkontis afablan onklinon el via kontinento, sed Esperanton ŝi tute ne scipovis. Nur unu solan vorton: "jes", sed ĝin ŝi elparolis perfekte. Tamen mi volas malkaŝi al vi, se tio povas estis konsolo, ke mi renkontis homojn el Anglujo, Francujo, Belgujo, Palestino kaj eĉ Sved-

lando, kiuj sciis Esperanton same malmulte kiel la hotentotan lingvon. Do la kongreso estis interesa ankaŭ el lingvoekzerca vidpunkto! — "Feliĉulino, kiu havas okazon ekskursi!" — diris al mi multokupita kongresano. "Min atendas longa vico da kunvenoj." — Vere ne estis tro enviinda tasko ŝviti interne de kvar muroj, kie kelkfoje, mi pensas, estis varmege en duobla senco, anstataŭ ĝui la belecon de Jungfrau aŭ revii ĉe la bordoj de Schwarzsee.

Prave oni nomis la kongreson "ekskursa", ĉar oni ekskursis tiom, ke la tempo preskaŭ ne sufiĉis por manĝado kaj la kelneroj ĉagrene sulkigis la frunton. Ni ekskursis per trajno, aŭtobuso, ŝnurfervojo kaj ŝipo, ni trapasis Svislandon en ĉiuj direktoj, ni veturis tra urboj, vilaĝoj, arbaroj, montpasejoj, ni preterflugis ĉarmajn dometojn, orajn grenkampojn, ĝojkriantajn infanojn kaj timigitajn kokojn (eĉ ne en la turista lando Svisujo la kokoj konas la trafikajn regulojn).

"Svislando estas bela", diris sinjorino el Tel-Aviv, "sed Palestino estas multe pli bela". — Mi komprenas ŝin sed tamen forte dubas. Ĉar, ĉu vere ekzistas pli rava lando ol Svisujo kun siaj brilaj alpsuproj, akvofaloj kaj smeraldoverdaj valoj?

Neniam mi forgesos la belegan panoramon de sur Niesen, kie mi kolektis kampanulojn intense blujn kiel Mediteraneo, nek la sunsubiron je la lago de Thun aŭ la ĉarman tro malongan viziton en Montreux. Dum la soifaj kunvojaĝantoj ĉirkaŭkuris en la urbo por serĉi kafejon aŭ bierejon, mi rifuĝis al la lago. Pendsalikoj staris ĉe la bordo, blankaj ĉignoj glitis sur la klara akvo kaj proksime vidiĝis la romantika kastelo de Chillon. Sed, kie deponi miajn monon kaj pasporton? Jen aperas sur la bordo bona feino! — kompreneble anglino — kaj al ŝi mi transdonis miajn terajn posedaĵojn kaj senzorge saltis en la lagon.

La nacia tago de Svisujo en la unua de aŭgusto estis bela travivaĵo. Bern preskaŭ dronis en floroj kaj flagoj, (eĉ la tagmanĝa deserto en nia hotelo estis dekorita per eta flago el marcipano) kaj festaj procesioj marŝis tra la urbo.

Plej bele estis en la vespero, kiam multkoloraj lanternoj brilis, artfajraĵoj flamis kontraŭ la ĉielo kaj la iluminita katedralo aspektis kiel fabela templo.

Tre solena sed malgaja momento estis kiam oni malhisis la gigantan esperantoflagon, kiu pendis en la kongresejo kaj la kongresanoj disiris post neforges-ebla semajno.

Mi vojaĝis al Genève por konsoliĝi. Kia mirinda situo ĉe la lago kun montoj kaj alpoj ĉirkaŭe! Kiaj grandiozaj monumentoj kaj parkoj! Inter abunda verdaĵo "dormetis" kvazaŭ sorĉa kastelo la blanka, pompa palaco de la Ligo de la Narcioj. Ĉu vi ne opinias, ke ĝi estus konvena sidejo de U. E. A.?

Kia brila perspektivo!

Imagu, en Genève mi ekvidis famulon! Myrdal, vi pensas? Feliĉe ne! Sed alian ankoraŭ pli faman, laŭ kiu strato, ponto, kajo ktp estas nomitaj...! Mont Blanc!!!

Dum kvarona horo mi ĝuis la vidaĵon de ĝia blanka vorto, poste la giganto surmetis nebulan kaloton.

Sed nun mi ne kuraĝas skribi pli longe, ĉar en Svedlando oni devas ŝpari paperon. Kaj se ĝi eble baldaŭ elĉerpigos, mi jam nun kaptas la okazon por deziri al vi kaj al la esperantoklubo en Sydney:


Bonvenon al la kongreso en Malmö venontan jaron!

Ella Nilson.

Ni vet

att det efter den 1 januari 1948 blir dyrare att anmäla sig till världskongressen i Malmö. Använd Eder av favören intill nyårsdagen.


Anmäl Eder omedelbart. Det sker lämpligast genom att insätta 20 kr. å postgirokonto 24 60 18 (Världsesperantokongressen, Malmö). Samtidigt insändes anmälningsblankett till samma adress. Anmälningsblankett finnes i Svenska Esperanto-Tidningens novembernummer. Kan även rekvideras från kongressbyrån (t. ex. på postgirotalongen).



Sveda popollernejo

Pro la komplezo de la firmao Skriv- och Ritboks-Aktiebolaget en Gävle ni povas disponi pri kliŝoj pri tute novkonstruita sveda popollernejo. Ĉar ĝi ŝajnas al ni pli malpli tipa por vere moderna sveda lernejkonstruo, ni volas ĝin prezenti al niaj en- kaj eksterlandaj legantoj, precipe al tiuj lastaj. Ni rekomendas al la svedaj legantoj, aĉeti ekstran ekzempleron de la gazeto por sendi al siaj eksterlandaj korespondamikoj.

La lernejo troviĝas en sveda loko Landsbro (cetere konata pro la fabrikado de muntopretaj "Boro"-domoj), kaj la bildmaterialon sendis al



La dua bildo estas el koridoro. La muroj ĝis duona alto estas tegitaj per fasadaj brikoj. La planko estas farita el malmola artŝtono el Högnäs, en brikformaj pecetoj.


Sur la tria bildo la klasĉambro estas jam okupita de la lernantoj. Sur la muroj pendas bildoj, kiuj estas elektitaj laŭ la aĝo de la infanoj. Laŭ unu el la longaj muroj estas malaltaj ŝrankoj, en kiuj ĉiu lernanto havas sian fakon. Por ko-



"Skriv-Rit" pastro B. Rudvall. Ni esperas, ke li nin ne denuncos pro la ŝtelo.

La unua bildo montras la konstruaĵon. Ĝi estas farita el brikoj. Ĝi tenas 8 klasĉambrojn, instruajn kuirejojn, ĉambron por memoraĵoj el la ĉirkaŭa regiono, instruistan ĉambron, bibliotekon kaj 2 ĉambrojn por instruiloj. (Mankas salono por gimnastiko kaj por slojdo. Ili estos en aparta domo, sed oni ne sukcesis havigi de la ŝtataj aŭtoritatoj la nuntempe bezonatan permeson ilin konstrui.)


Ekster la lernejo estas ludkorto, sportkorto kaj instrucela ĝardeno.





muna uzo kaj por ilaro estas aliaj fakoj. Ses lampoj provizas la ĉambron per lumo dum mallumaj horoj.

La kvara bildo prezentas al vi ekipon de la instruistaro. Kiel vi vidas, ĝi estas provizita per unu elektra kaj du lignohejtaj fornoj. La "mebloj" cetere ja estas la plej konvenaj por plifaciligi la laboron kaj doni al la lernantinoj (eble ankaŭ lernantoj) proponon pri taŭga aranĝo



de ŝrankoj kaj ceteraj meblaĵoj en bona kuirejo.

Ni rigardas la sekvantan paĝon kaj per la kvina bildo ekhavas impreson pri la porinstruista ĉambro, kiu estas tre bone meblita, kaj kiu trovis la aprobon de la instruistaro.

La sesa bildo montras la benkojn de iom pli mallonga distanco ol pli frue, ĉar oni deziras montri la konstruon de la benkoj. Benko konsistas el tablo kaj seĝo sur fundamento de ŝtalaj tuboj. La konstruo estas farita tiel, ke la infanoj ne bezonas movi la seĝon, kiam ili starigas. Cetere, en multaj lernejoj la infanoj restas sidantaj, kiam ili respondas la demandojn de la instruisto. Tiel ne fariĝas tiom da bruoj.

La sepa bildo el la ilara ĉambro.

Ĉefa liveranto por la lernejo estas la en la komenco menciita firmao Skriv- och Ritboks-Aktiebolaget (Skrib- kaj Desegnokajera Kompanio), kiu certasence meritis sian propran artikolon. Ĝi liveris tablojn kaj benkojn, la ekipon por la lernejo kaj la instruistaro, meblojn por la instruista ĉambro, kurtenojn ktp, ktp.

La plej interesa en la oka bildo estas la "nigra" tabulo, kiu ne estas nigra. Ĝi konsistas el sabloblovita vitro, fiksita en kadro sur la muro. Malantaŭ la vitro la muro estas verde kolorigita.



Tiu, kiu ne subskribis tiun ĉi priskribon, povas aserti, ke tiel oni ekhavas tre taŭgan tabulon. Mi dum kelkaj jaroj kun plena kontenteco uzis tian.

Nun ni priskribis svedan popolan lernejon de moderna tipo. La infanoj vizitas la popollernejon inter siaj 7-a kaj 15-a jaroj, se ili ne transiras al aliaj lernejoj. Ni esperas, ke niaj legantoj ekhavis bonan ideon pri la aspekto, kaj ni finas per danko al "Skriv-Rit", kiu pruntedonis la kliŝojn, kaj al pastro Rudvall, kiu fakte estas la origina kaŭzo de tiu ĉi bildaro.



Inter la grim pantaj rozoj

de *Selma Lagerlöf*

Mi dezirus, ke tiuj homoj, inter kiuj mi travivis mian someron, faligu siajn rigardojn sur ĉi tiujn liniojn. Nun post kiam venis malvarmo kaj malhelaj noktoj, mi volus rememorigi ilin pri la grim pantaj rozoj, kiuj ĉirkaŭis la verandon, pri la delikata, iom maldensa foliaro de *Rosa Bengalensis*, kiu tiel en sunbrilo kiel en lunlumo desegniĝis per malhelgriza ombro sur la helgriza ŝtona planko kaj ĵetis malpezan puntovualon sur ĉion ekstere, kaj pri ĝiaj grandaj, helaj floregoj kun la ŝirigintaj randoj.

Aliaj someroj rememorigas al mi trifoliejojn aŭ betularojn aŭ astrakanpomojn kaj berarbetaĵojn, sed ĉi tiu somero ricevis sian karakteron de la grim pantaj rozoj. La helaj, delikataj burĝonoj, kiuj toleris nek venton nek pluvon, la facile balanciĝantaj, helverdaj branĉidoj unujaraj, la mole kliniĝintaj trunkoj, la superabunda riĉeco da floroj, la gaje zumantaj aroj de l' insektoj, ĉio ĉi sekvos min kaj releviĝos antaŭ mi en sia tuta pompo, kiam miaj pensoj reiras al la somero, la serena, bela, delikata somero.

Nun, kiam venis la tempo de laboro, oni ofte demandas min, kiel mi pasigis mian someron. Tiam ĉio alia forglitas el mia memoro, kaj ŝajnas al mi, kvazaŭ mi sidadis tagon post tago sur la verando malantaŭ la grim pantaj rozoj kaj ensorbadis odoron kaj sunlumon. Kion mi do faris? Ho, mi rigardis kiel aliaj laboras.

Tie estis malgranda tapetist-abelo,* kiu laboradis de mateno ĝis vespero, de mateno ĝis vespero. El la molaj, verdaj folioplatoj ĝi elsegis per siaj akraj makzeloj malgrandan, belaspektan ovalon, kunvolvvis ĝin tiel, kiel oni kunvolvas efektivan tapeton, kaj kun la kara ŝarĝo premita al sia korpo ĝi forflirtis al la parko kaj sidigis sur malnovan arbostumpon. Tie ĝi profundigis en mallumajn irejojn kaj misterajn galeriojn, ĝis fine ĝi atingis la fundon de vertikala ŝakto. En ĝia nekonata profundaĵo, kien nek formiko nek miriapodo iam kuraĝis penetri, ĝi sternis la verdan folivolvaĵon kaj tegis la malebenan plankon per plej bela tapiŝo. Kaj kiam la planko estis tegita, la abelo revenis preni novajn folioplatojn por tegi la murojn de l' ŝakto kaj laboris tiel rapide kaj fervore, ke baldaŭ ne troviĝis unu folio en la rozospaliro, kiu ne havis ovalan eltranĉon, atestantan ke ĝi devis kontribui al la ornamado de la malnova arbostumpo.

Iun belan tagon la eta abelo ŝanĝis laboron. Ĝi boris sin profunden inter la implikiĝintaj folioj de l' gigantaj rozoj, suĉis kaj trinkis kiom ĝi nur kapablis en ĉi tiuj belaj provizejoj, kaj kiam ĝi ricevis unu plenuŝon, ĝi tuj forflugis al la malnova arbostumpo por plenigi la justapetitan ĉambron per plej klara mielo.

Sed la malgranda abelo ne estis la sola, kiu laboris tie en la rozospaliro. Tie ankaŭ troviĝis araneo, tute senegala araneo. Ĝi estis pli granda ol iaspeca araneo, kian mi iam vidis, ĝi estis hele flavruĝa kun klare punktita kruco sur la dorso, kaj ĝi havis ok longajn, ruĝ- kaj blankstriaĵajn krurojn, ĉiujn egale bone desegnitajn. Vi nur devus vidi ĝin ŝpini! Ĉiu fadeno estis tirata kun la plej ekstrema precizeco, tuj de la unuaj, kiuj estis nur por apogo kaj fiksado, ĝis la plej internaj, delikataj teksfadenoj. Kaj vi devus esti vidintaj ĝin ekvilibre sin movi antaŭen laŭ la maldikaj fadenoj por kapti muŝon aŭ por okupi sian tronon en la mezo de l' reto, senmova, pacienca, atendanta plurajn horojn.

Ĉi tiu granda flavruĝa araneo gajnis mian koron: ĝi estis tre pacienca kaj tre saĝa. Ĉiutage ĝi havis sian bataleton kun la abelo, kaj ĉiam ĝi sin eltiris el la afero kun la sama nemankanta takto. La abelo, kiu havis sian vojon dense preter la araneo, fojon post fojo kaptiĝis en ĝia reto. Tuj la abelo komencis zumi kaj ŝiri, ĝi taŭzis la delikatan reton kaj kondutis kiel frenezulo, kio kompreneble nur havis tiun sekvon, ke ĝi ankoraŭ pli forte kaptiĝis kaj ke tiel kruroj kiel flugiloj estis envolvitaj en la glueca teksaĵo.

Tiuj kiam la abelo estis ellacigita kaj paralizita, la araneo alrampis. Ĝi ĉiam sin tenis je deca distanco, sed per la plej ekstrema pinto de unu el la elegantaj ruĝ-

striaĵ kruroj ĝi donis al la abelo puŝeton, tiel ke ĝi turniĝis en la teksaĵo. Kaj post kiam la abelo ree zumis kaj ĝislace furiozis, ĝi denove ricevis unu plej mildan puŝeton kaj poste ankoraŭ unu kaj ankoraŭ unu, ĝis ĝi turniĝadis kiel turbo kaj jam ne estis konscia en sia furiozo kaj tiel konfuziĝis ke ĝi ne povis sin defendi. Sed dum ĉi tiu turniĝado ĉiam pli kuntordiĝis la fadenoj, kiuj ĝin tenis kaptita, kaj la streĉeco fariĝis tiel granda, ke ili rompiĝis, kaj la abelo falis teren. Jes, ĝuste tion kompreneble volis la araneo.

Kaj ĉi tiun artaĵon ili povis reifaradi, ĉi tiuj du, tagon post tago, tiel longe kiel la abelo havis laboron en la rozospaliro. Neniam la malgranda tapetisto povis lerni sin gardi de la aranea reto, kaj neniam la araneo montris koleron aŭ malpaciencon. Efektive mi amis ilin ambaŭ, la malgrandan, fervoran, vilan laboriston same kiel la grandan, ruzan maljunan ĉasiston.

Grandaj okazaĵoj ne ofte havis lokon en la korto kun la grim pantaj rozoj. Tra la spaliro oni povis vidi la malgrandan lagon palpebrumantan kontraŭ la suno. Kaj tio estis lago, tro malgranda kaj tro ĉirkaŭŝirmita por povi sin levi kun efektivaĵoj ondoj, sed je ĉiu eta krispiĝo sur la griza supraĵo disflugis miloj da fajretetoj, kiuj briletis kaj ludis sur la ondoj: tio estis kvazaŭ la tuta profundo estus plena je fajro, kiu ne povas elliberiĝi. Kaj tia estis la somera vivo tie: ĝi kutime estis tre kvieta, sed se nur venis la plej eta krispiĝo — ho, kiel ĝi povis lumvibri kaj briletadi!

Kaj grandaj aferoj ne estis bezonataj por nin ĝojigi. Floro aŭ birdo povis doni al ni gajecon por pluraj horoj, por ne mencii la tapetist-abelon. Neniam mi forgesos kiel kore ĝoja mi foje estis pro ĝi.

La abelo estis en la aranea reto kiel kutime, kaj la araneo kiel kutime helpis ĝin elliberiĝi, sed ĝi estis firme kaptita, tiel ke ĝi devis treege longe turniĝadi kaj estis tre kvieta kaj subigita, kiam ĝi forflugis. Mi klinis min antaŭen por vidi, ĉu la aranea teksaĵo estas grave difektita. Nu, feliĉe ne, tamen jen malgranda flava larvo sidis kaptita en la reto, malgranda fadene maldika monstro, kiu konsistis el nur makzeloj kaj ungoj, kaj mi estis skuata, vere skuata ekvidante ĝin.

Ĉu mi ne konas ilin, ĉi tiujn larvojn de l' majskarabo, kiuj milope surrampas la florojn kaj sin kaŝas sub iliaj petaloj? Ĉu mi ne konas ilin kaj ankaŭ admiras ilin, ĉi tiujn persistajn, ruzajn parazitajn, kiuj sidas kaŝitaj kaj atendas, nur atendas, se necese eĉ dum semajnoj, ĝis venas abelo, en kies flavanigra felo ili povas sin kaŝi? Kaj ĉu mi ne scias pri ilia malica lerteco, ĝuste kiam la eta ĉelkonstruinto plenigis ĉambron per mielo kaj sur ĝian supraĵon metis tiun ovon, el kiu elvenos la ĝusta posedanto de l' ĉelo kaj de l' mielo, ĝuste tiam malsuprenrampi sur la ovon kaj fervore ekvibrante resti sur ĝi kiel sur boato, ĉar se ĝi falus en la mielon, ĝi dronus.

Kaj dum la abelo kovras la fingringosimilan neston per verda tegmento kaj singarde enfermas sian idon, la flava larvo per akraj makzeloj disŝiras la ovon kaj konsumas ĝian enhavon, dum la ovoŝelo ankoraŭ devas servi kiel naĝveturilo sur la danĝera miellago.

Sed iom post iom la maldika flavulo fariĝas plata kaj granda kaj povas mem naĝi sur la mielo kaj trinki el ĝi, kaj en la pleneco de la tempo venas el la abela ĉelo grasa, nigra skarabo. Sed certe ne tion la eta abelo volis produkti per sia laboro, kaj kiel ajn ruze kaj lerte la skarabo agis, ĝi tamen estas nenio alia ol maldiligenta parazito, kiu meritas nenian kompaton.

Kaj mia abelo, mia propra diligenta abeleto, ĉirkaŭflugis kun tia parazito en la felo! Sed dum la araneo turnadis la abelon, la larvo malfiksiĝis kaj falis sur la aranean teksaĵon, kaj nun venas la granda flavruĝulo kaj epikas ĝin per la venenhoko kaj en unu momento transformas ĝin en skeleton sen vivo kaj enhavo.

Kaj kiam la eta abelo revenis, ĝia zumado estis kvazaŭ himnokanto al la vivo.

"Ho, vi bela vivo!" ĝi diris. "Mi dankas vin, ke mia loto estas la gaja laboro inter rozoj kaj sunbrilo. Mi dankas vin, ke mi povas vin ĝui sen timo kaj maltrankvilo. Mi ja scias, ke embuskas araneoj kaj ŝtelas skaraboj, sed miaj estas la gaja laboro kaj la kuraĝa senzorgeco. Ho vi bela vivo, vi agrabla ekzistado!"

El la sveda originalo tradukis

Birger Gerdman.

* Megakilo, speco de abelo, *Megachile centuncularis*.

HINDAJ RAKONTOJ

Unu el niaj kunlaborantoj, s-ro F. Engelmann el Hungarujo, rakontas al ni la jenajn historietojn pri sia vojaĝo en Hindujo.

En la jaro 1920, venante el Hindujo, ni havis sursipan gazeton kun la titolo "La Esperantisto". En ĝi estis kelkaj el miaj travivaĵoj en Hindujo. Sube mi sendas kelkajn. La gazeto aperis ĉiun duan tagon sur la ŝipo.

1. La fontoplumo.

Sciante, ke oni ricevas por proksimume 1 Rupio fontoplumon ĉe la strata vendisto, kvankam li petas komense eĉ 6 Rupiojn, ni foje decidis provi, kiel kondukus tia vendisto, se oni intencas doni al li pli multe, ol li komence kutimas peti.

Kiam ĉe iu stratangulo oni prezentis al ni tian fontoplumon, mi diris al la vendisto:

— Se vi donos la fontoplumon por sep Rupioj, mi aĉetos ĝin.

— Nu, Master, — li respondis iom konsternite, sed videble ĝojplene, — kvankam ĝi kostas al mi akurate 7 Rupiojn, mi ĝin donas al vi por 7 kaj 50.

2. La almozulo en Kolombo.

Foje mi veturis per tramvagono ĝis la ponto de la reĝino Viktorio kaj transpasinte, mi rimarkis jam de malproksime Cejlonanon venantan renkonte al mi.

Li estis nudpieda, vestita per la kutima singaleza jupo kaj per blanka jako sur nuda brusto, kun cilindroĉapelo en dekstra mano. Li estis proksimume 45—50-jara, altkreska, maldika singalezo. Fiere kaj dandante li venis renkonte en tia kostumo, subite haltante antaŭ mi kun supermezura memrespekto kaj kun pozo, kvazaŭ li pretigus sin al subskribo de l' packontrakto, kaj metante unu piedon streĉitan antaŭ la alian, tuŝante la teron nur per la granda piedfingro, li faris elegantan geston per la dekstra mano kaj ekparolis jene:

— Ĉu vi permesas al mi Sinjoro, ke mi vin tedu por kelkaj cendoj?

3. La bananaro.

Triope ni vagadis en Kolombo tra la tuta urbo, nome s-ro Mihalik¹, s-ro Staho kaj mi. Multe ni vagadis, jen tirataj en unu, jen en alian vendejon. Komprenu bone, kara leganto, tirataj ni estis, ne de magneto, sed de la komercistoj, kiuj, laŭ tiea kutimo, senĉese logadis nin en siajn vendejojn.

Ju pli oni logis nin, des malpli ni aĉetis.

Por liberigi fine de la strata nigra junularo, kies seninterrompaj: "Master, master, give money" aŭ "Ruski, davaj djengi" (kio signifas: "Sinjoro [Ruso] donu monon", ĉar tiom ili sciis eĉ ruse) — estis ankoraŭ pli enuigaj, s-ro Mihalik proponis eniri en bazon por aĉeti bananojn.

— Bone! kaj ni aprobis ĉiuj. — Ni aĉetu bananojn!

Enirinte en la bazon, ni post duonhora marĉando fine efektive aĉetis tutan bananaron, pendantan ĉirkaŭ brakdika trunko, havanta 60—70 cm-ojn, — por ne malpli ol 75 cendoj.

Sed — dank' al Dio — ni liberigis almenaŭ de la nigruletaro kaj havis fine bananojn, tute ne parolante pri tio, ke anstataŭ la strata junularo nun iomete ne vidigis en la ĉirkaŭaĵo similaj teduloj.

Delasinte la bazon, ni estis tute feliĉaj kaj daŭrigis promenadi. Dume, jen unu, jen alia el ni deŝiris bananon de la trunko, kaj tiel manĝante sur la strato, baldaŭ evidentigis al ni, ke nun refoje la vendistoj ektedis nin, kelkfoje eĉ pli multe ol antaŭe. Laŭ hungara proverbo ni do "falas el akvositelo en akvujojn" sed ni havis bananojn!

"Nenio daŭras eterne" diras malnova proverbo kaj laŭ tiu ĉi proverbo fine ne restis pli multaj bananoj sur la trunko, ol kelkaj bananaĉoj. La ŝelojn de la bananoj ni ne kuraĝis jeti sur la trotuaron pro timo de la policistoj, starantaj ĉie, kie oni ne bezonas ilin; kiel ni kuraĝu do forjeti simple, sencere monie la trunkegon de l'bananaro? Ni do decidis ĝin portadi alterne.

¹ S-ro Mihalik (Jozefo) estas la prezidinto de la Hungarlanda Esp. Societo.

Subite s-ro Mihalik, — ĉar li portis tiumomente la restaĵon de nia regalajo — decidege volis ĝin forjeti, sed jen, reaperis la policisto, ĵus nin rigardante, kvazaŭ li sciis pri nia krima intenco.

Ho, diablo! Kiel ni liberigu do de la trunko? Tiu ĉi problemo turmentis nin tutvoje, ĉar ni ja ne povas ĝin portadi tra la tuta urbo kvazaŭ sanktaĵon en festtago. Inter senhalta logado: Master, ruski, come on, idji ktp. subite ekkaptis iu vendisto la trunkon, volante tiri s-ron Mihalik en la vendejon. Unuamomente tute instinkte s-ro Mihalik per ĉiu sia forto retiris la trunkon, sed post ekpenso, juĝante la momenton taŭga por liberigi de la trunko, ĉesis ĝin reteni kaj forrapidis kvazaŭ per rulsuoj.

La konsternita vendisto, havante la trunkon kun bananaĉoj en la manoj, postkriegis per ĉiuj fortoj: Ho, master, master Sed s-ro Mihalik plengoje rekriis: "Forigu al diablo kune kun la trunko! Mi ĝojas, ke mi fine liberigis de ĝi. Neniam plu mi aĉetos bananaron."

4. La ventumistino.

Mi estis en la ĉefa strato, vagante tien-reen, suprenmalsupren. La varmego estis terura, la reflektigantaj sunradioj kvazaŭ bakis min. Ju pli granda estis mia klopodo, defendi min kontraŭ tiu ĉi natura, sed teda realajo, ju pli mi baraktis por ŝirmi min, des pli mi estis ĉirkaŭata de la strata tedularo, eĉ de altaĝuloj, kiuj seninterrompe petegis, ke mi donu do fine miajn kelkajn Rupiojn, kiujn mi ankoraŭ havis en mia poŝo. Kial mi ne donu ilin? Kial mi — malfeliĉa militkaptito — bezonas Rupiojn? Kial mi havu Rupiojn, cendojn? Mi ja veturos aliloken, kie mi tute ne bezonas Rupiojn, oni eĉ rifuzos ilin. Kial mi estu ŝargita de Rupioj, tia superfluaĵo por mi, mi eble eĉ kunvolvigus kiel erinaco pro la superflua ŝarĝo kaj dolorigos mian korpon. Ne estas necese ruinigi, mortpenadi min pro tia bagatelo. Se mi transdonos miajn Rupiojn, mi povos multe pli libere, senzorge, senŝarĝe kaj senmone vagadi sur la ĉefa strato kaj mi eĉ ne devas timi ŝtelistojn, kiuj estas tre multnombraj en Kolombo.

Jam pro kutimo mi preskaŭ tute ne rimarkis tiun ĉi aron ĉirkaŭ mi kaj malgraŭe enprofundiĝis en miajn pensojn. Tiel granda estis mia distriteco, ke mi efektive komencis disdonadi mian monon, pro kio la alkuro de almozuloj ankoraŭ kreskis.

Subite mi vekigis el tiu ĉi revado. Rigardante dekstraflanken, mi sentis, ke oni manfrotas, mankaresas mian mentonon 2—3 foje vere dorloteme kaj serĉante la kuzinton, mi ekvidis virinaĉon proksimume praepokan, kiu versimile estis la ventumistino de la unua cigana vojevodo en Hindujo 2683 jarojn antaŭ Kristo. Mi vidis jam tre malbelan centjarulinon, sed tian sorĉistinon mi eĉ ne estus povinta imagi.

Ŝi faris tre afablan mienon, karesante min kaj klopodis esti kiel eble plej ĉarma. Cio estis vana, ĉar mi subite ekkuris kun rapideco, kompare al kiu la rapideco de "Jinrikiŝa-isto" (durada fiakreto, tirata de homo) estas nur mizera limaktrenado. Mi ne volis plu reriĝardi, sed kiam mi opiniis esti sufiĉe malproksime, mi kuraĝis reriĝardi, sed inter la novevenintoj — dank'al Dio — mi ne vidis plu la ventumistinon.

Kara leganto! Evidu tiun straton!

5. La Policano.

Revenante de la Ponto de Viktorio, mi konstatis, ke mi ne veturis per la ĝusta tramvagono al la Parko de Viktorio, sed mi estis en tute falsa direkto.

Por ke mi povu per plej mallonga vojo atingi la parkon, mi decidis demandi pri la vojo policanon staranta ĉe unu el la ekstremoj de la ponto. Li estis beltalia singalezo, konscia pri sia ofico, kaj bone parolis angle.

— Ĉu vi povus eble diri al mi, per kiu vojo mi povus plej facile atingi la Parkon de reĝino Viktorio? — mi demandis lin.

— La vojon al la parko? li rediris. Nu por iri al la parko. La plej mallonga vojo? ?

Rimarkinte, ke li ne povas doni taŭgan konsilon al mi, mi mem ekparolis:

— Ĉu ne estus bone reiri al la ekstrema ĉefstrata haltejo kaj tie ŝanĝi vagonon al la parko?

— Ho, tre ĝuste Sinjoro, faru tiel. Tute ĝuste. Jes, jes.

— Koran dankon pro via klarigo, — mi diris — klopodante malaperi.

OPINIO RECENZISTA

ESPERANTO 60-JARA, Skizo pri la evoluo de la lingvo literatura, de G. J. Degenkamp. Eldonis Libroservo F. L. E. Amsterdam. Aĉetebla ĉe Förlagsföreningen Esperanto, prezo: Kr. 2: 75 (kartonita).

Ĉi tiu jubilea libreto estas tre interesa, instrua kaj pensiga verko pri la evoluo de la literatura lingvo Esperanta. Ĝi estas nepre studinda kaj certe donos al la leganto pli vastaniman rigardmanieron en la juĝado pri diversaj lingvaj demandoj. La tuta libro spiras admiron al D:ro Zamenhof kaj al la pioniroj de Esperanto pro ilia grandioza laboro en la kreado kaj ellaborado de la literatura lingvo. Samtempe ĝi atestas objektivan kaj kompreneman juĝon pri modernaj tendencoj kaj fenomenoj en la evoluo de la lingvo. En la fino de la libreto troviĝas du specimenaj tekstoj, "La neĝa blovado" de Puŝkin, tradukita de Grabowski en la unua jaro de Esperanto, kaj ĉapitro el "Cezaro" de Jelusiĉ, tradukita de Ivo Rotkviĉ en 1934. Ili prezentas temon por interesa komparo. Persone mi ne hezitas doni mian preferon al la unua, malgraŭ arĥaismoj kaj neglataĵoj, ĉar "Cezaro" donas impreson de intenca eksperimentado pri la lingvo. En kia maniero ekz. "ŝi fieras aldone" superas al "ŝi fiere aldonas"? — Kurioza koincido: ĵus aperis en la semajna ĵurnalo Hemmets Veckotidning sveda traduko de La neĝa blovado fare de Ellen Rydelius. Tie oni do povas fari interesajn komparojn.

La lingvo estas neordinare bona. Frapis min nur la plurfoja nekomprenebla uzo de ol post tro, ekz. en jena frazo: "la problemo estas tro komplikita, ol ke oni povus kontentige solvi ĝin". Preseraroj estas malmultaj. Ĉiun ĉapitron kvazaŭ moto enkondukas strofo, iom diletanta rimajo, kiu prefere povus malesti.

Fine mi ne povas ne citi jenajn vortojn pri lingva disciplino tute konformajn al mia propra opinio, kiun pli frue mi havis okazon esprimi tie ĉi: "Se Esperanto estus lingvo, parolata de speciala gento, al neniu el tiuj gentanoj la ideo venus en la kapon arbitre uzi la lingvon laŭ propraj gustoj, sed oni aplikus ĝin, obeante ĝiajn regulojn. Esperanto, tamen, havas la malbonŝancon esti uzata — ho ironio! — ne de esperantianoj, sed de esperantistoj, el kiuj multaj kredas havi la rajton personaguste manipuli la lingvon, ne sentante sin ligitaj de ia morala disciplino". Aliloke ni tamen trovas la konsolajn vortojn, ke "nun ekzemple al neniu serioza homo venas en la kapon la ideo proponi ŝanĝojn en la lingvon".

Birger Gerdman

ESPERANTA KRESTOMATIO. Kompilita de H. A. De Hoog, A. J. Kalma, W. F. Kruit, Wigbertus van Zon. Eldonis Nederlanda Centra Komitato Esperantista. Prezo: 3: — kr.

Nedisputeblan valoron havas tiu ĉi libro, speciale kompilita por la aspirantoj de la nederlanda A-diplomo esperanta sed certe tauga ankaŭ por svedaj ekzamenoj. La kaŭzo de la libro estas, laŭ la kompilintoj, manko de kurslibro pli moderna ol Fundamenta Krestomatio, kiu malgraŭ siaj evidentaj avantaĝoj ne ĉiurilate estas konforma al la nuntempa lingvuzo (oni citas ekzemplojn kiel "la ambaŭ trompantoj", "ŝi kantas la plej bele"). Nature Zamenhofaj tekstoj tamen formas la "fundamenton" de la nova krestomatio; oni trovas en ĝi multajn artikolojn, kiuj montras la kapablon de Zamenhof en diversaj kampoj. La lernanto eĉ ekkonas kelkajn el la plej famaj poemoj de nia majstro: La Espero, La Vojo, Mia penso, Ho mia kor'. La tuta tekstmaterialo estas ĝustproporcia miksaĵo de prozo kaj poezio. Aŭtoraj nomoj kiel Baghy, Grabowski, Kabe kaj Privat garantias altnivelan verdlingvan stilon. Gravan kritikon oni povas direkti nur kontraŭ la rakonton "Kiel Mihok instruis angle", kie formikumas nacilingvaj (pleje rusaj) esprimoj fonetike skribitaj — tre nenecesa kaj ne tre agraba elemento en esperanta legolibro. Kun tiu sola rezervaĵo la 120-paĝa libro plene rekomendinda.

Ebbe Vilborg

Ĉe kolegoj

Argentino apenaŭ fidus al Esperanto.

En la laste alveninta al ni numero de 0 Brasil Esperantista, ni legas, ke la argentinaj esperantistoj esperas pri pli grandaj sukcesoj por la katolika esperantista movado. Ni citas: "Estas dezirinde, ke tiu movado ĉiam pli kaj pli prosperu: ĉar nur ĝi povos helpi la argentinan Registaron kompreni la neŭtralecon de nia movado. Tia kompreno ĝis nun ne ekzistas en la granda argentina nacio. Tie la registaro rigardas esperanton kiel ian strangan politikan internacian movadon apenaŭ tolereblan. En Brazilo kaj multaj aliaj landoj la neŭtraleco de la esperantomovado estas perfekte komprenata, kaj la lingvo estas uzata por la plej diversaj celoj privataj aŭ oficialaj."

S-ro Ismael Gomes Braga en 0 Brasil Esperantista skribas: "La mondo ankoraŭ ne povas kompreni la ekziston de tia kulturo, kia restas en la limoj de Esperantujo, tiu estas, sur nia malgranda planedo, la Esperanta mondkulturo." — Ni ne citas tiujn liniojn pro la nekompreneblo de la mondo, sed pro la ĝojo povi konstati, ke gravaj esperantistoj konsciiĝas pri la mondkultureco de esperanto. Vere nia movado jam estas kultura afero, kaj ni devas daŭrigi en tiu direkto.

Sensacia malkovro.

Ergo en Arbetearesperantisten skribas:

En la antikva tempo oni kredis, ke Nus, la diino de Racio, regis la mondon. En niaj tagoj estas tia koncepto naiva, ĉar ni scias, ke la mondo estas regata de unuigo de prudento, sento kaj volo, kiuj ecoj kune konsistigas la homan naturon.

Feliĉulo, kiu sukcesis havi tian scion! Ni, ceteraj naivuloj, ankoraŭ vagas en la mallumo.

Praktiko por la paco.

El Nederlando venas la informo, ke la gazeto La Praktiko denove aperos ĉe la komenciĝo de la nova jaro. Ĝi estos la organo de la Universala Ligo, kies celo certe estas al la plej multaj esperantistoj konata. Se ne, petu informojn de la ĉefrepresentanto por Svedujo, s-ro Lennart Aberg, Box 16, Skövde. La jara abono estas 24 steloj, t. e. en sveda mono 8.40 kr. La Praktiko estas tro konata por bezoni ian rekomendon. La Universala Ligo estas espereble tiun ligan, kiun la oficialaj rondoj volus, sed ne povas, fondi. Ĝia celo estas la paco kaj la starigado de praktikaj servoj al la membroj. Ĝi ne estas esperanta asocio, sed ĝi uzas kiel oficialan lingvon esperanton. Se estos eble, la ligoj en Svedujo formos sekcion en la kadro de Sveda Esperanto-Federacio.

Rosaria Stelo

opinias, ke la plej bona metodo propagandi esperanton estas, ke oni ĉe ĉiu deca okazo parolu esperanton. Kompreneble oni tion ne faru tiel, ke oni estigu ridon pri si, sed tre ofte oni povas uzi tiun metodon.

HISTORIO DE USONO. Verkis Agostinho da Silva. Tradukis Manuel de Freitas. Portugala Eldona Rondo. 28 paĝoj. Prezo: 0: 60 kr.

Portugala Eldona Rondo nun prezentas novan libreton en sia serio "Enkonduko en la kulturon". La sveda esperantopubliko jam konas profesoron da Silva pro antaŭaj verketoj en zoologio kaj geografio. Kiel rakontanto pri historio li montriĝas tre objektiva. Li tre klare rakontas pri faktoj kaj okazintaĵoj, sed li — aŭ eble la tradukinto? — ne povas eviti certan pezon de la stilo, kiam temas pri teoriaj rezonadoj. Lingve la libro estas senerara sed nebrila. La enhavo tuŝas la vere esencajn punktojn en la usona historio; tamen oni, kredeble intence, dediĉis tre malgrandan spacon al nia jarcento. Legado de tiu ĉi broŝuro estas opurtuna maniero refreŝigi siajn sciojn pri la evoluo de la nuntempe aktualega granda respubliko. Ebbe Vilborg

Kroze tra la lingvo

ARABAJ VORTOJ EN ESPERANTO.

Ne nur la okcidentlandaj lingvoj kontribuis al la granda komuna vorttrezoro internacia, sur kies fundamento esperanto estas fondita. Tiel ekzemple la araba lingvo dum la grandperiodo de la islama regno en la mezepoko eksportis multajn terminojn kulturajn al la europaj nacioj, ĉefe pere de la hispana lingvo. Ĉu vi scias, ke tiuj vortoj esperantaj ĉiuj estas de origino araba: algebro, alkoholo, alkovo, admiralo (ĉiuj enhavantaj la difinitan artikolon al-), artiŝoko, ĉifro, cifero, dogano, ĝirafo, jupo, kamforo, kando, karafo, karato, karobo, matraco, safrano, sofo, sukero, talismano, talko, tamburo, tarifo, taso.

LA VIRA FORMO

estas kutime la fundamenta formo de la esperantaj substantivoj, ekzemple viro (el latina vorto vir), el kiu ni faras vir-in-o. Ni scias nur du ekzemplojn de la kontraŭa speco, t. e. kiam la esperanta virinformo estas rekte pruntita el nacia lingvo. Temas pri la vortoj fraŭlino el germana Fräulein kaj pri edzino el germanaj vortoj kiel Prinzessin princ-edzino. En tiuj okazoj do la viraj formoj estas nur duarangaj.

PRI "VIVO" DE LINGVOJ.

Oni ofte parolas pri "malvivaj" kaj "vivaj" lingvoj. Tamen ĉi tiuj terminoj ne estas ekzaktaj. Oni metas la latinon kaj la antikvan grekan lingvon inter la mortaj, kaj tamen ili havas rektan daŭrigon en la hodiaŭ parolataj latinidaj resp. en la moderna greka lingvoj. Eĉ la latino mem foje estas uzata por sciencaj celoj, ekz. en lingvistiko kaj medicino. La "morta" sanskrito ankoraŭ funkcias kiel interkomprenilo inter erudiciitaj hindoj diverslingvaj. Certe oni povas diri, ke lingvoj vivaj estas tiuj, kiuj estas lernataj kiel gepatraj lingvoj. Sed ankaŭ tio ne estas preciza: okazis en pasintaj jarcentoj, ke infanoj lernis latinon antaŭ ol sian nacian lingvon, kaj en nia tempo ja ofte infanoj de esperantaj gepatroj unue komencos praktiki la mondlingvon. La neeblecon de tiu distingo montras fine la revivigo de la hebrea lingvo dum la 19-a jarcento. Ĝi nun servas kiel komunikilo inter judoj, malgraŭ ke ĝi estis "morta" dum pluraj jarcentoj. Strange do estas paroli pri vivaj kaj mortaj lingvoj koncerne la naciajn, sed rekte absurde estas nomi esperanton malviva — lingvo, en kiu funkcias kaj floras vortoj ĉiutage uzataj en diversaj aliaj lingvoj.



— Nun vi povas fini, ĉar li ekdormis!

Ordrikt — och svärlärt

Engelskan är det ordrikaste språket i världen, åtminstone om man skall döma av det unika Oxford Dictionary, som innehåller ett större antal ord än något annat språk i världen. Antalet uppgår till inte mindre än 414 825, medan franskan, som kommer närmast inte räknar mer än omkring 200 000 ord. Ryska lexikon innehåller omkring 150 000 och italienskan och spanskan räknar ungefär 100 000 ord vardera.

Arbetet på att samla alla dessa ord i Oxford Dictionary tog lång tid — inte mindre än 44 år. Engelskan erbjuder naturligtvis tack vare denna ordrikedom en mångfald nyanser. Men vilket arbete att lära sig alla! Detta torde inte kunna lyckas ens för en infödd engelsman, än mindre för andra, som skall studera engelska endast på skolbänken. Bl. a. på grund av sin svärlärdhet är engelskan omöjlig som världshjälpsspråk för den stora massan av jordens bebyggare.

Esperanto kommer troligen inte långt efter engelskan, då det gäller antalet nyanser i språket. Ingen har någonsin gjort ett försök att åstadkomma en översikt över alla möjligheter, som står till buds. Här skapar den kunnige esperantisten av ett jämförelsevis litet antal ordstammar, en 2 000 å 2 500 stycken, de betydelseskiftningar, han behöver. I engelskan måste man däremot i stort sett lära sig ett ord för varje nyans. Att skillnaden i arbete måste bli avsevärd, står klart för var och en.

Den som har användning för engelska, skall naturligtvis lära sig detta språk, inte tal om den saken. Men låt oss säga, att 10 % av den tid och av de kostnader, som lägges ner på språkundervisning i världens skolor, avsattes till undervisning i esperanto. Mera skulle inte behövas, för att esperanto skulle slå igenom som hjälpspråk, berett att fungera överallt, där man behövde talas vid över språkgränserna. Kunskaperna i esperanto efter 100 timmars studier skulle i omfattning ungefär motsvara kunskaperna i t. ex. engelska efter 900 timmars studier. Den praktiska färdigheten att använda det inhämtade ordförrådet skulle för vardera språket bli ungefär densamma. Under sådana förhållanden verkar det meningslöst att spjärna mot udden. Skillnaden i kunskaper hos en som läst engelska i 900 timmar och en annan, som läst språket i 1 000 timmar torde under i övrigt lika förhållanden knappast märkas. Varför då inte på de där 100 timmarna lära sig ett språk till? Och därtill ett, som vore användbart kring hela jorden?

Kiu respondos?

En la septembra numero de La Espero staras sur paĝo 98, dua kolono supre: "genom att befria språket från alla diftongljud". Ĉu skribita en nokto ĉapo?

Salex.

Lingva demando.

Vad är egentligen skillnaden mellan komerco och negoco (komercisto och negocisto)? Kan man använda ordet aferoj i betydelsen (göra) affärer? Jag har sett ordet aferema använt i betydelsen affärsmässig. Är det riktigt?

Rogo.

TILL MALMÖ

är parollen för 1948. Vänta ej med att anmäla Eder! Låg kongressavgift till den 31/12 i år. 20 kr. kostar det och postgirokontot har nummer 24 60 18 (Världsesperantokongressen, Malmö).

Unu jaron

mi nun provis redakti nian gazeton. Mi kaptas la okazon esprimi al ĉiuj miaj helpantoj kaj amikoj mian plej koran dankon por la pasinta tempo kaj deziri al ili belajn festotagojn kaj feliĉan novan jaron. Mi esperas, ke mi povos estonte kalkuli kun ĉiam kreskanta nombro da helpantoj. Se jes, ni gvidos nian ŝatatan entreprenon al brila estonto. Oskar Svantesson.

Nia rondo familia

NAMNBYTE Paul Isacson, Älgårås har av Kgl Statistiska Centralbyrån beviljats antaga släktnamnet **ELGANDER**.

Inga Kristoffersson mortis.

La 7-an de novembro forlasis nian rondon la eksinstruistino Inga Kristoffersson. Si dum multaj jaroj estis la korektantino de la taskoj, kiujn sendis al ŝi la studentoj de la koresponda kurso de SEF.

Ĉe ŝia tombo por **KELI** parolis s-ro Artur Wallin, por **SEF** kaj ties Stockholma klubo redaktoro Paul Nylén. Krom tiuj, florkronon sendis i. a. Eldona Societo.

Nia decembra konkurso

Ĉirkaŭ sia akso facile movebla rado en forko, en esperanto verŝajne estas nomata rulbloko. Super tia rulbloko estas metita ŝnuro, kies ambaŭ egalalteestantaj finoj pendas malsupren. Je unu fino pendas simio, je la alia pezaĵo. Tiu "sistemo" estas en ekvilibro. La simio decidas suprengrimpri kaj realigas sian decidon. Kio okazos? (La bremzan efikon ĉe la radakso oni neglektas.) Solvojn, sur **aparta** papero kun via adreso, antaŭ la 15.1.1948 sendu al Oskar Svantesson, Skonertgatan 1, Göteborg V.

Espereble por la lasta fojo ni petis la helpon de la legantoj pri la redaktado de la gazeto. Pri tio la legantoj ne esprimas siajn opiniojn. Pro ĝentileco. Gajnis la oktobran konkurson Josef Hammarlind, Rävlanda.

DOKUMENTARO

ORDBOK och HANDBOK FÖR FILATELISTER

ESPERANTO - ENGELSKA - FRANSKA - HOLLÄNDSKA - TYSKA

302 sidor

Inbunden i vackert klotband med förnämlig guldprägling.

Kr. **14:50**

S-ro J. P. Jordens skriver i inledningen bl. a.: "DOKUMENTARO" är en ovärderlig tillgång för filatelin med dess omfattande terminologi. Den klara uppställningen med dels en 5-språkig ordlista med kod-numrering, dels en encyklopediavdelning omfattande 18 kapitel och mängder av illustrationer gör detta vackra verk till en tillförlitlig handbok för filatelister i alla länder.

Ett uppslagsverk som detta utgör en aldrig sinande källa ur vilken ägaren kan hämta kunskap och hjälp för internationell korrespondens, vid studier av filatelistisk litteratur eller facktidningar på holländska, engelska, esperanto, franska eller tyska."

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO
Fack 190 71 Stockholm 19 Postgiro 578

RADIO

ĈIUTAGE:

17.30—17.45 Praha 25,34 m kaj 1935 m.
23.00—23.15 Praha 31,41 m.

En ambaŭ la supraj sendoj de Praha raportoj ĉiuspecaj. Ĉiumonate ankaŭ informo pri la esperantista vivo en Ĉeĥoslovakujo. La enhavo de la du sendoj estas malsama. Adreso: Esperantoservo de Radio Praha, Stalinstrato 12, Praha XII.

LUNDE:

22.50—23.00 Praha I 470 m. Tre varia programo.
23.30—23.35 Budapeŝt I 550 m. Informoj. — Hungara Radio, VIII. Bródy Sándor u. 7, Budapeŝt, Hungarujo.

MARDE:

18.45—18.50 Bern 31,46 kaj 48,66 m. Prelegas A. Baur pri svisaj aferoj. — Schweizer Kurzwellendienst, Neugasse 30, Bern.
19.50—20.00 Sofia 32,09 m. Informoj el Bulgarujo. — Radio Sofia, Esperantosekcio, Sofia, Bulgarujo.
22.50—23.00 Ostrava 259 m. Aktualajoj en Ĉeĥoslovakio. Leterkesto. — Esperantoservo de la Radiostacio, Ostrava, Ĉeĥoslovakio.

MERKREDE:

06.35—06.45 Wien I 506 m. Esperantokurso. — RAVAG-Wien, 30a Argentinierstrasse, Wien IV, Aŭstrio.
21.10—21.25 Warszawa III 49,06 m. Politikaj informoj. — Esperantosekcio de la Pola Radio, Koszykowa 8, Warszawa, Polujo.
23.30—23.35 Budapeŝt I 550 m. Vidu sub Lunde.

JAŬDE:

17.50—17.55 Wien II 31 m, 41 m kaj 228 m. Informoservo.
18.45—18.50 Bern 31,46 kaj 48,66 m. Federalismo kaj paco, paroladetoj de dro Edmond Privat.
20.45—21.00 Hradec Králové 238 m.
22.50—23.00 Praha I 470 m. Vidu sub Lunde.
23.00—23.10 Ostrava 259 m. Vidu sub Marde.

VENDREDE:

19.50—20.00 Sofia 32,09 m. Vidu sub Marde.
22.50—23.00 Ostrava 259 m. Vidu sub Marde.
23.30—23.35 Budapeŝt I 550 m. Vidu sub Lunde.

DIMANCE:

06.00, 07.00, 10.00 12.00 Radio-Esperanto (nigra stacio) 2,5 kaj 5 m.

SPORADE:

4.1.48. je 16.00—16.15 sveda radio 19,80 m kaj 27,83 m. Informoj pri la Universala Kongreso en Malmö.
1.2.48. je 16.00—16.15 sveda radio 19,80 m kaj 27,83 m. Informoj pri la Universala Kongreso en Malmö.

Esperantaj radiosendoj

pri la 33-a U. K. en Malmö.

En la monatoj januaro—julio 1948, la unuan dimanĉon ĉiumonate je la 16.00—16.15 h MET (15.00—15.15 h Greenwich), okazos radiosendoj el la sveda radio per mallongaj ondoj 19,80 m kaj 27,83 m. La sendoj informos pri la universala kongreso.

Aliaj gazetoj estas petataj represi. Ni danke akceptos raportojn pri la disaŭdigoj al la 33-a Universala Kongreso de Esperanto, Malmö, Svedujo.

Brevväxla med Ungern!

Den ungerska tidningen Uj Magyarorzag (Nya Ungern), som utkommer i Budapest, förmedlar adresser för personlig brevväxling på esperanto mellan svenskar och ungrare. Meddela önskemål, yrke, intressen m. m. till Uj Magyarorzag, Zoltan-utca 6, Budapest 5, Ungern.

Korespondu

Holanda fraŭlo, 30-jara, deziras korespondi kun svedino. Mi laboras en la teksta industrio kaj volas interŝanĝi ideojn pri ĉiuj nuntempaj problemoj. Hendrik Stoute Jr. Ambonstraat 4, Leiden, Nederlando.

S-ro Sergio Salusfoggia, St. dei Conciatori 24, Biella, Italujo, 16-jara studento, dez. kor. kun juna espistino.

Ina Blaauwbroek, 25-jara burolistino, Fuchsiasstraat 64, Den Haag, Nederlando, dez. koresp. kun samaĝa sved(in)o.

Eugeno Grich, lernejestro, Poproč, p. p. Jasov, Ĉeĥoslovakujo, dez. kor. pri pedagogio.

Erich Dilger, 13B — München 8, Hörselbergstr. 14—I, Bavaria, Germanujo, U.S. Zone.

D-ro Dücsö Csaba, Ferenc Körut 39, Budapest IX, Hungarujo, kun klera samideanino.

S-ro Paul Bröther, 20 Hockeln Nr. 42, Kr. Marienburg, Post Gross-Düngen, Germanujo, Brita Zono.

S-ro Rastislav Chomo, skolto, H viezdoslovova ul, č. 171, Liptovský Hradok, Slovakio, Ĉeĥoslovakio.

S-ro M. Tuset, c. Cardova 2. Manresa (Barcelona), Hispanujo.

S-ro Angel Servet Artí, C. Nueva Valldura, 34—30, Manresa (Barcelona), Hispanujo.

F-ino Luiza Xavier, Rua do Rem, Nr. 49, Panta Delgada, S. Miguel, Acares, Portugalujo.

F-ino Maria Teof. Ververniótou, Odos Kefallinias 66, (Kaminia), Pireo, Greklando.

F-ino Maria Sp. Papakonstantinou, Odos Erasmas 8 B, Kipseli-Ateno, Greklando.

F-ino Aimilia Nik. Pilati, Odos Spiridonos Trikoupi 63 A, Ateno, Greklando.

50 lernantinoj (15—18-jaraj) de "faklernejo por virinaj okupoj", Prostějov, Stalinova 3, Ĉeĥoslovakujo, lernas esp. kaj dez. kor., interŝ. fotojn, pm, modgazetojn ktp kun geesperantistoj de la tuta mondo.

Svenska Esperanto-Tidningen

La Espero

Organ för Svenska Esperanto-Förbundet

Ansvarig utgivare: W. Wahlund

Redaktör: Oskar Svantesson, Skonertgatan 1, Göteborg V. Tel. 29 03 81.

Prenumerationspris. Helt år (12 nr) kr. 4:—. Lösnummer: 0:40. Eksterlanda abono kr. 4:50 aŭ 15 int. respondkuponoj.

Annonspris: 0:20 pr mm. Korrespondensannons: 1:50 (aŭ 5 int. respondkuponoj).

Expedition: Förlagsföreningen Esperanto (se nedan).

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO u. p. a. Postadress: Fack 19071, Stockholm 19. Expedition: Sveavägen 98, VI. (Kl. 19—21.) Telefon: 31 65 01 (förlagschef 50 88 05). Postgiro: 578. (Böcker, tidningar m. m.)

SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET (Sveda Esperanto-Federacio), Tegelbacken, Stockholm C. Tel. 20 00 43. Postgiro 20 12.

MEDLEMSAVGIFTER. Direkt ansluten medlem erlägger kr. 7:50 pr år och erhåller tidningen gratis. Familjemedlem, som ej erhåller tidningen, erlägger kr. 4:— pr år.

Föreningar. Enl. beslut å SEF:s årsmöte 1947 skall kollektiv prenumeration ske från alla föreningar anslutna till SEF. För varje medlem erlägges en avgift av kr. 5:— (familjemedlem kr. 2:—). Medlemsförteckning (vari familjemedlem betecknas med F) insändes av föreningens kassör senast i januari.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO. Ĉefdelegito redaktoro Einar Adamsson, Värmlandsgatan 18, Göteborg. Tel. 14 58 40, postgira konto 443 81. Kotizoj: MJ 4:— kr., MA 10:— kr., MS 20:— kr., kaj Patrono 100 kr.

Manuskriptoj por numero 2 atingu la redaktoron plej laste je la 15. 1. 1948

S-ro W. Chalmers, 65 Charterhouse Ave., Wembley, Middelsex, Anglujo, dez. kor. kun esperantostudent(in)o.

YTONG

är det idealiska väggmaterialet för bostadshus och industribyggnader. Tack vare den stora isoleringsförmågan ger den fuktfria och sunda bostäder. Undvik trähusets brandrisk och höga underhållskostnader. Bygg i bättre klass genom att använda Ytong.

Bygg för framtiden ett högisolering stenhus till samma eller lägre pris än ett trähus.

**YXHULTS STENHUGGERI A.B.
Hällabrottet**

BOKNYTT UNDER 1947

(Sammandrag av "Månadens Boktips")

SPEGULO HOMARANA — Dikter av J. H. Erkkö. Illustrerad av A. Gallen-Kallela	Kr. 0:75
PENSOJ DE ZAMENHOF — På fem språk	Kr. 1:—
VIVO DE ZOLA — Biografi. A. da Silva	Kr. 2:50
PREMIAJ ROMANETOJ — 23 berättelser	Kr. 2:50
ANTONIO KAJ KLEOPATRA — W. Shakespeare	Kr. 2:50
ELEKTITAJ NOVELOJ — Ĉina antologio. Lu Sin	Kr. 3:50
LA NEVENKEBLA ĜENO — Roman. Th. Thijssen.	Inb. Kr. 7:50
ARBOJ DE LA ARBARO KAJ KAMPO — Fr. Booth. Illustrerad	Kr. 1:50
NOVAJ ESPERANTO HISTORIETOJ. (Dansk Esperanto Forlag)	Kr. 2:50
FILATELISTA PROSPEKTO pri 28 poŝtmarkoj de la nova aŭstria pejzaĝserio	Kr. 0:30

Nyheter för december:

ESPERANTO 60-JARA — Skizo pri la evoluo de la lingvo literatura. J. G. Degenkamp. Kart. Kr. 2:75	
ESPERANTA KRESTOMATIO — H. A. de Hoog, A. J. Kalma, W. F. Kruit, Frato Wigbertus van Zon	Kart. Kr. 3:—
DU AMOSENTAJ NOVELOJ: <i>Imenlago</i> — Th. Storm; <i>Maruŝka</i> — M. Escherich	Kr. 1:75
ĈE LA SANKTAJ AKVOJ — Schweizisk roman av J. G. Heer (Del I och II)	Kr. 5:50
DOKUMENTARO — Handbok för filatelister. (Se specialannons)	Kr. 14:50

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO

Fack 19071

Stockholm 19

Postgiro 578



ABONNERA

UTLÄNDSKA ESPERANTO-TIDNINGAR 1948

Afrika Revuo	5:—
American Esperantist	6:—
Argentina Esperantisto	3:—
The British Esperantist	3:—
Dansk Esp. blad	3:—
Esperantobladet (Norge)	3:—
Esperanto (UEA)	7:—
Franca Esp.isto	6:—
HEROIDO	14:50
Internacia kulturo	9:—
Kompreni (Lyon)	2:25
La Praktiko	8:40
Rio Esperantista	7:50
Svisa Espero	3:—
La Verda Steleto (Italien)	2:50

Inbetala till postgiro

578

Förlagsföreningen
E S P E R A N T O
Stockholm 19

